

66-a jaro n-ro 193 2025:3

la lampiro



**Pri la antikva
tupia**

Plej freŝa eldonaĵo de EASP



Suspensa romano
originale verkita
en Esperanto kun
dekkvino da belaj
ilustraĵoj tutpaĝaj.



Per aĉeto de ĉi tiu verko vi subtenas
la Edukan Fonduson de **Programo
Mia Amiko** ĉe EASP, ĉar 80% de la
vendoj iras rekte al ĝi.

easp.org.br/butiko

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Nia revuo plu flagretu
- 5 | **Kino kaj aliaj artoj**
La konklavo
- 6 | **Kovrilartikolo**
Pri la antikva tupia
- 11 | **El mia vidpunkto**
Mia amiko, venu!
- 12 | **Por iom pripensi**
Ĉirkaŭmuri la timon
- 16 | **Edukado**
La nevidebla laboro de virinoj:
teoriaj kaj sociaj konsideroj
- 18 | **Iom da filozofio**
Demandoj al Simone de Beauvoir
pri virinaj aferoj, tamen ne nur.
- 21 | **Iom da poezio**
Ĉiutaga poezio
- 22 | **Simpla vivo**
Malgranda povas esti tre granda
- 24 | **Resume**
Iom pri la Akademio de Esperanto
- 26 | **Iom da gramatiko**
Lingvaj Respondoj
- 28 | **Movado**
Unu plia bela kultur-ekskurso
- 29 | **Kuriozaĵo**
Kion ili diris

Kovrilbildo: Tupia viro (1643), Albert Eckhout
– Vikipedio



66-a jaro n-ro 193 2025:3

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2025

Simpla Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Nia revuo plu flagretu

Paulo Sergio Viana

Ĉi tiu numero de nia revuo estas riĉenhava! Gravaj geamikoj en nia brazila Esperantista kulturo komprenas la gravecon de nia periodaĵo kaj bele kontribuas.

Ĉi-foje, inter aliaj legindaj tekstoj, mi elstarigas tiun de nia kara samideano el la suda regiono de nia lando, Miguel Bento. Li produktis pripensindan artikolon pri la tupia lingvo — do pri la origino mem de nia brazila animo. En tempo, kiam indiĝenaj lingvoj estas pli respektataj, kiam oni rekomendas protektadon al tiu valora heredaĵo de la homaro, la studaĵo de Bento estas tre bonvena. Ni invitas niajn legantojn pripensi ĝin kaj komenti.

Sed ne nur. Nia nuna numero enhavas plurajn aliajn legindaĵojn. Ni menciuj ankaŭ la belegan paroladon de la mozambikano Mia Couto, kiun por ni Esperantigis James Piton; la trafan tekston de akademiano Fernando Pita pri la graveco de la Akademio de Esperanto; kaj ni bonvenigu novan verkanton por La Lampiro — nian amikon Milton Paulo de Lacerda, kun la espero, ke li plu kontribuu per siaj pensoj, en la sekvontaj numeroj.

Ni kore dankas al ĉiuj aŭtoroj, el kiuj kelkaj fariĝas jam konstantaj kontribuantoj. Ni sendu la lumon de nia Lampiro al la mondo, kiel nian brazilan aldonon al la tutmonda Esperanta kulturo!

flugfolio

<https://flugfolio.xyz>

La konklavo

Anna Lobo de Carvalho

Originala nomo: Conclave

Direktoro: Edward Berger

Aktoroj: Ralph Fiennes, Carlos Diehz, Stanley Tucci

Lando: Usono kaj Britio

Tipo: Mistero/ Suspenso

Lanĉo: 2024 (mondo) 23.01.2025 (Brazilo)

Tempodaŭro: 120 min

Ĉi-foje mi decidis paroli pri filmo, kiu estis elektebla por la kategorio de la plej bona filmo de la premio Oscar de 2025 – La Konklavo. Mi ja tre scivolemis pri tiu ĉi filmo. Granda motivo de mia elekto estas ankaŭ la okazigo de nova konklavo pro la forpaso de nia bonkora Papo Francisko. Malgraŭ ja la malboniĝo de la sano de Francisko, estas interese ke unu jaron post la lanĉo de la filmo, oni okazigos vere novan konklavon.

Tiu filmo estas bazita sur samnoma libro de Robert Harris, lanĉita en 2016. Ĝia historio estas simpla. Post la forpaso de la Papo pro fulma koratako, la



Kardinalo Thomas Lawrence, meze de persona krizo de fido, devas gvidi la konklavon laŭ bonorda vojo. Kaj tiu tasko montriĝos tre malfacila, pro tio ke estas multaj sekretoj, komplotoj kaj bataloj inter la kardinaloj. Kaj plej grava estas la risko ke kelkaj “komplikaj” kardinaloj estu elektitaj.

La vestoj, scenejo, aktorado, kaj filmado estas tre allogaj. Oni povas iom vidi kaj sperti iom pri kia estas iu

(Daŭrigota sur la paĝo 15)

Pri la antikva Tupia

Miguel Bento

En la pasinta Brazilia Kongreso de Esperanto (BKE), okazinta en Novembro 2024 en la urbo Salvador, ĉiu partoprenanto ricevis en sia kongresa sako paĝindikilon. Oportuna donaceto de AERJ (Asocio Esperantista de Rio-dejaneiro), sed baldaŭ montriĝis, ke ĝi estas iom neordinara. Oni anoncis, ke ĉiu el la cent plurdek paĝindikiloj estas unika, kaj portas la nomon de unu specifa indiĝena lingvo el Brazilo! Ĉiu homo do estis invitita esplori, legi, eble eĉ skribeti pri la prenita lingvo. Trafa iniciato, ĉu ne?

Sur mia paĝindikilo troviĝas la nomo "tupiniquim". Kiu estas tiu lingvo, kaj kiuj estas la homoj kiuj ĝin parolas, aŭ iam parolis? Inter la multaj lingvo-kaj tribonomoj el Brazilo, certe ĝi estas unu el la plej konataj: la vorto "tupiniquim" estas uzata en la portugala kiel iaspeca sinonimo de "brasilano" (bedaŭrinde ofte kun iom pejorativa tono). Nu, ĝuste la tupinikinojn la portugaloj unue trovis je sia alveno en 1500, kaj ĝuste ilin priskribas Pero Vaz de Caminha en sia

fama letero! En la 16-a jarcento ili vivadis laŭlonge de la marbordo de Brazilo, inter la riveroj Cricaré (nun en la ŝtato Espírito Santo) kaj Camamu (nun en la ŝtato Bahia). Kaj per tio la atentema leganto jam povas diveni la ceteron: pro tiu geografia malizoliteco



Tupia virino, Albert Eckhout – Nacia Muzeo de Dinamarko, Kopenhago, 1641.

la tupinikinoj estis unu el la popoloj plej forte frapataj de la ĉiaspecaj malbonaĵoj de la koloniantoj – malsanoj, amasbuĉado, elkulturigo... Feliĉe tamen ankoraŭ ekzistas indiĝenaj komunumoj, kiuj rekonas sin tupinikinaj – ili troviĝas ĉefe en la municipo Aracruz, en la ŝtato Espírito Santo. Sed nun ili ĉiuj parolas denaske la portugalan... ĉu tamen la iam uzata lingvo lasis spurojn? Pri la "tupinikina lingvo" ekzistas artikoloj en Vikipedio, kaj ĝi troviĝas en la lingvolisto ISO 639-3. Tamen, ĉiam kiam mi provis akiri iomete pli da informoj, miaj esploroj kondukis al nenio. Post pli ampleksa serĉado mi alvenis al konkludo, kiu eble sonas absurde: la "tupinikina lingvo" fakte neniam ekzistis! Ĝi estas ekzemplo de t.n. falsa lingvo ("língua espúria" en la portugala), alivorte, lingvo, kiu nek ekzistis nek ekzistas, sed aperas en lingvolistoj. Tiu konata fenomeno povas okazi pro diversaj kialoj: jen oni konfuzas nomojn de lingvoj kaj nomojn de popoloj aŭ lokoj, jen oni nomas dialekton lingvo, jen temas pri tradukeraro... unuarigarde la tuta afero mirigis min, sed aliflanke kompreneblas, ke oni ne sukcesas bone orientiĝi pri ĉiuj sep mil kelkcent lingvoj de la mondo...

Kiun lingvon do la tupinikinoj uzis? Temas pri la antikva tupia, kiu, kun

kelkaj dialektaj diferencoj, estis vaste parolata de la diversaj marbordaj indiĝenaj popoloj – tupinikinoj, tupinambaoj, potigvaroj, tamojoj... Evidente, la koloniantoj devis lerni kaj uzi ĝin por interagi kun la lokanoj. En la jarcentoj 16-a kaj 17-a ĝi fakte estis dum multaj jardekoj la superreganta lingvo en nia pli kaj pli mestiza Brazilo! Iom post iom, tamen, pro la grandaj sociaj ŝanĝoj okazantaj, la antikva tupia aliĝis kaj disbranĉiĝis en almenaŭ du lingvojn, "Língua Geral Paulista" (Ĝenerala Lingvo Sanpaŭlia) kaj "Língua Geral Amazônica" (Ĝenerala Lingvo Amazonia). Tiuj lingvoj plu ludis gravan rolon dum jardekoj, sed iom post iom marĝeniĝis, ne nur pro la fama malpermeso de Markizo de Pombal en 1758, sed ankaŭ, eĉ ĉefe, pro la grandaj migrofluoj kaŭzitaj de la ekspluatado de oro kaj de kaŭĉuko, kiuj kreis medion pli favoran al la uzo de la portugala kiel interlingvo. La ĝeneralaj lingvoj forsvenis kaj preskaŭ mortis: restas nur unu rekta ido de la antikva tupia, Nengatuo (Bona Lingvo), parolata de kelkaj miloj da homoj, en sufiĉe izolitaj komunumoj en la nordo de Brazilo.

La tupia tamen estas la indiĝena lingvo kiu plej multe rolis en la formiĝo de Brazilo, kaj sekve tiu, kiu plej multe influis la brazilportugalan.


Tiel, nia "klasika indiĝena lingvo" parte plu vivas pere de tiu ampleksa influo, kvankam la deveno de tiuj miloj da vortoj kaj parolturnoj ofte restas nekonata al la brazilanoj kiuj uzas ilin ĉiutage. Ĉu vi scias, ke "caipira" venas de "kopira" (sarkanto, sarkisto)? Ke "paroli" en la antikva tupia estas "nhe'eng", kaj de ĝi venas la esprimo "ficar de nhenhênem"? Same la esprimo "ir para a cucuia" venas de la tupia: "kuî" estas fali, kaj "kukuîa", dekadenco... La listo estas enorma!

Pluraj vortoj, nomantaj lokajn plantojn kaj bestojn, ekuziĝis ankaŭ en aliaj lingvoj, kaj eniris, nerekte, eĉ Esperanton. Jen kelkaj ekzemploj (ĉu

vi konas ilin?): agutio, agvarao, akaĵuo, ananaso, arao, grumiŝamo, ipekakuan, jaborando, jaguaro, jakarando, kapibaro, koenduo, kopaivo, manioko, nanduo, piranjo, pitango, tamanduo, tangaro, tapioko, tapiro, tukano. Multaj el tiuj vortoj tamen estas similaj en la antikva gvarania, do oni povas argumenti, ke ili eniris la eŭropajn lingvojn paralele el tiuj du fontoj.

Tre atentokapta estas ankaŭ la kontribuo de la tupia al la brazila toponimio. Miloj da urboj, riveroj, montoj ktp. havas tupidevenan nomon. Ofte tiu deveno estas rekonebla, sed malofte oni scias pri la originalaj signifoj: Tietê (tre bona rivero), Tijuca (putra rivero; marĉo), Ipanema (mis-aŭgura (senfiŝa) rivero), Caraguatatuba (aro de bromelioj), Itaquaquecetuba (aro de tranĉ-bambuoj), Sorocaba (ter-ŝiraĵo)... ankoraŭ pli kurioze: pluraj tiaj nomoj ne aperis spontanee, sed estas artefaritaĵoj el la pasinta jarcento! Kaj, inter tiuj, kelkaj bedaŭrinde estis mise ellaboritaj... ekzemplo estas Jaguariúna – la celita signifo estas "rivero de la nigra jaguaro", sed fakte ĝi signifas "nigra rivero de la jaguaro"!

La tupia plu vivas ankaŭ pere de la restantaj skribaĵoj el la du unuaj jarcentoj de la kolonia Brazilo: temas




pri vojaĝraportoj, dokumentoj, beletraĵoj ktp. en tiu lingvo, tre valoraj atestoj de nia historio. Ekzistas ankaŭ prilingvaj verkoj produktitaj en tiu tempo: ĉi-rilate aparte menciindas la jezuitoj, kiuj, en sia klopodo konverti la indiĝenojn, sin dediĉis al la studo kaj kultivo de la tupia – la fama José de Anchieta skribis gramatikon de la lingvo kaj multon plian en ĝi. Estas tamen malvera la aserto ofte trovata en Esperantujo, ke la jezuitoj unuecigis la tupian, kreante "iaspecan Esperanton" – tion la esperantisto kaj amatora antropologo Francisco Schaden klarigis jam en 1947 (vd. la indikon artikolfine). Cetere, ankaŭ estas ne-taŭĝe nomi la lingvon "tupi-gvarania": la antikva tupia estas membro de la tupi-gvarania lingvofamilio, al kiu apartenas ankaŭ la antikva gvarania, la nuna gvarania (parolata ĉefe en Paragvajo) kaj multaj aliaj.

Bedaŭrinde, dum multaj jardekoj la scienca studado de la tupia restis en tro malalta nivelo, sed feliĉe tio nuntempe ŝanĝiĝas, ĉefe danke al la klopodoj de la konata profesoro Eduardo de Almeida Navarro, kiu dediĉas sian karieron al la antikva tupia kaj al Nengatuo. Liaj du plej grandaj verkoj, "Método Moderno de Tupi Antigo" kaj "Dicionário de Tupi Antigo", estas nemalhaveblaj por la

interesataj studemuloj. Li ankaŭ kiel unua plene tradukis la ses leterojn de la indiĝenoj Camarão, la ununurajn ekzistantajn dokumentojn skribitajn de indianoj en la brazila kolonia periodo. Kaj nun estas en preparo granda studo pri la tupidevenaj nomoj en la brazila toponimio.

Sed Eduardo Navarro ne limiĝas al la akademias fakrondoj; tute male, per siaj vervo kaj karismo li sukcesas ankaŭ popularigi la tupiajn sciojn. Li eĉ instruas al la indiĝenoj, kiuj per la lingvo volas pli bone koni siajn proprajn radikojn! Scivole mi spektis la unuajn filmetojn de la kurso, kiun profesoro Navarro disponigis en Jutubo.



Aldone al diversaj fascinaj heredaĵoj en la portugala, oni tuj konatiĝas kun tre interesaj trajtoj de la lingvo: la litero "b" estas prononcata kiel en la hispana, ĉiu vokalo havas nazalan "version" (ã, ê, ĭ, õ, ŭ, ĵ), estas postpozicioj anstataŭ prepozicioj, tute mankas artikoloj, la substantivoj ne varias laŭ nombro, estas du pronomoj respondaj al "ni": unu inkludas la aŭdanton (ĝandé), la alia ne (oré)... Ekzistas ankaŭ posedebaj kaj neposedebaj substantivoj: oni ekzemple ne povas diri "mia arbo" (almenaŭ ne en tiu rekta formo)... Ankaŭ la konata esperantisto kaj poligloto Francisco Valdomiro Lorenz okupiĝis pri la tupia: li tradukis versaĵojn al Esperanto, kaj lia "Kompleta Gramatiko de la Tupia Lingvo" estis posteume eldonita, kun multaj aldonadoj, de Fabricio Possebon kaj Fernando Pita. Cetere, antaŭ kelkaj jaroj alia grava verko kun indiĝena fono estis finfine posteume eldonita: "Amazonia Urno", de Leopoldo Knoedt. Ni ne preteratentu ilin!

Nu, multon mi ankoraŭ ne povis mencii, sed la artikolo jam iĝis tro longa! Se vi interesiĝas pri la temo, mi varme invitas vin plu esplori. Ho, kaj ĉu ankaŭ vi ricevis paĝindikilon en la lasta BKE? Se jes, nepre ne forgesu almenaŭ iom legi pri la koncerna lingvo!

Ĉefaj konsultitaj verkoj

LORENZ, Francisco Valdomiro. Kompleta Gramatiko de la Tupia Lingvo. Org. Fabricio Possebon kaj Fernando Pita. Câmara Brasileira de Esperanto, 2015.

NAVARRO, Eduardo de Almeida. Dicionário de Tupi Antigo - a língua indígena clássica do Brasil. Editora Global, 2013.

NAVARRO, Eduardo de Almeida. Método Moderno de Tupi Antigo - a língua do Brasil dos primeiros séculos. 3ª edição. Editora Global, 2005.

NAVARRO, Eduardo de Almeida. Os Falantes do Tupi Antigo - origem, história e distribuição geográfica no passado. Disponibla ĉe:

<https://tupi.fffch.usp.br/sites/tupi.fffch.usp.br/files/Os%20falantes%20do%20tupi%20antigo.pdf>

NAVARRO, Eduardo de Almeida. Transcrição e tradução integral anotada das cartas dos índios Camarões, escritas em 1645 em tupi antigo. Boletim do Museu Paraense Emílio Goeldi, v. 17, n. 3, 2022. Disponibla ĉe:

[http://editora.museu-goeldi.br/bh/artigos/chv17n3_2022/transcricao\(navarro\).pdf](http://editora.museu-goeldi.br/bh/artigos/chv17n3_2022/transcricao(navarro).pdf)

NAVARRO, Eduardo de Almeida. Curso de Tupi Antigo pela Internet. Disponibla ĉe:

<https://www.youtube.com/playlist?list=PLkoBVfEA-QEgiNNXQ1Xm-B1vKr00qwIIW>

SCHADEN, Francisco. Pri "Língua Geral". En: Rio Esperantista, nov/1947, p. 3.



Mia amiko, venu!

João Otávio Veiga Rodrigues

Akceptu vi tian bonegan veturilon!

Ĝi estas tre komforta kaj adekvata al viaj bezonoj. Ĝi havas du kruojn, du brakojn kun tre utilaj manoj, tre viglan koron, unu kapon kun tre rafinita cerbo, por via monda aventuro.

Dum via aventuro zorgu ĝin, ĉar via veturilo bezonas serenajn sintenon por sia bona funkciado: nek la stresan agadon nek la neniofaradon!

La toleremo – benzino – kaj la pacienco – lubrikaĵo – estas devigaj por longa kaj daŭranta uzado de tiu veturilo.

Via aventuro celas fari la bonon al viaj proksimuloj. Tiel vi estos feliĉa! Pro tio ŝaltu la lumigilojn de

via boneca agado, ĝoje kaj entuziasme, ĉar via lumiga agado montros la vojojn al viaj gejunuloj!

Se unu aŭ du partoj de via veturilo difektiĝos dum la aventuro, trankviliĝu ĉar ĝi rapide povos esti riparita en iu ajn riparejo laŭlonge de via vojo.

La precipa zorgo de via aventuro estas alveni ĝis la fino ĝoje kaj dankeme.


Bonan aventuron!!

João Otávio Veiga Rodrigues

Rotaria Esperanto-Klubo – Brazilo

PDG 2016/2017 – D4560 –

Rotario Internacia



Ĉirkaŭmuri la timon

Mia Couto (1955), ps. de
António Emílio Leite Couto,
premiita mozambika
verkisto kaj biologo.



La timo estis unu el miaj unuaj instruistoj. Antaŭ ol ekfidi ĉielajn estaĵojn, mi lernis timi monstrojn, fantomojn kaj demonojn. La anĝeloj, kiam ili alvenis, jam devis gardi min. La anĝeloj agis kiel agentoj de privata sekureco de la animoj.

Ne ĉiam kiuj min protektis, tiuj sciis la diferencon inter sento kaj realo. Tio ekzemple okazis kiam ili instruis min timi la nekonatojn. Vere la plej granda parto de perforto kontraŭ la infanoj ĉiam fariĝis ne pro fremduloj, sed pro familianoj kaj konatoj. La fantomoj, kiuj rolis en mia infanaĝo reproduktis tiun malnovan eraron, ke ni estas pli sekuraj en medio, kiu estas familiara al ni.

Miaj gardanĝeloj estis naivaj kredi, ke mi estis pli protektita nur pro tio, ke mi ne riskas trans la limojn de mia

lingvo, mia kulturo kaj mia teritorio. La timo estis do la instruisto, kiu plej malinstruis al mi. Kiam mi forlasis mian hejmon, nevidebla mano ŝteladis al mi la vivkuraĝon kaj la aŭdacon esti mi mem. Sur la horizonto montriĝis pli da muroj ol vojoj.

En tiu momento io sugestis al mi la jenon: estas en la mondo pli da timo al la malbonaj aferoj ol malbonaj aferoj mem.

En la kolonia Mozambiko, kie mi naskiĝis kaj kreskis, la rakonto pri timo havis enviindan internacian rolantaron. La ĉinoj, kiuj manĝis infanojn, la tiel nomataj teroristoj, kiuj batalis por la sendependeco kaj barbohava ateisto kun germana nomo. Tiuj fantomoj havis la finon de ĉiuj fantomoj: ili mortis tiam, kiam mortis la timo.

La ĉinoj malfermis restoraciojn apud nia pordo, la tiel nomataj teroroj hodiaŭ estas respektindaj regantoj kaj Karlo Markso, la ateista barbulo, estas simpatia avo, kiu ne lasis posteulojn. La prezo de tiu konstruado de teroro estis tamen tragika por la afrika kontinento. Nome de la lukto kontraŭ Komunismo, oni faris la plej neesprimeblajn barbaraĵojn.

Nome de la monda sekureco, oni instalas kaj konservis en regado iujn el la plej sangavidajn diktatorojn el la tuta Historio. Kiel plej grava en tiu longa heredaĵo de ekstera interveno troviĝas la facilanimo de afrikaj elitoj, kiuj kulpigas aliajn pri siaj propraj malsukcesoj.

La Malvarma Milito malvarmiĝis, sed la maniĥeismo ĝin subtenanta ne malinstaliĝis, inventante aliajn timgeografiojn: la Orientan kaj la Okcidentan kaj pro tio, ke temas pri diablaj entoj, ne sufiĉas la sekularaj regmetodoj. Ni bezonas intervenon kun dia legitimado.

Kio estis ideologio, tio fariĝis kredo. Kio estis politiko, tio fariĝis religio. Kio estis religio, tio fariĝis strategio de regado.

Por fabriki armilojn, necesas fabriki malamikojn. Por fabriki malamikojn, nepras vivteni fantomojn.

La konservado de tiu maltrankvilo postulas koston aparataron kaj taĉmenton da fakuloj, kiuj sekrete faras decidojn je nia nomo. Jen kion ili diras al ni: por superi la enlandajn minacojn, ni bezonas pli da polico, pli da prizonoj, pli da privata sekureco kaj malpli da privateco. Por alfronti terglobajn minacojn, ni bezonas pli da armeoj, pli da sekretaj servoj kaj la portempan suspendon de nia civitaneco.

Ni ĉiuj scias, ke la vera vojo devas esti alia. Ni ĉiuj scias, ke tiu alia vojo povus komenciĝi, ekzemple, per la deziro pli bone koni tiujn, kiujn ni lernis ambaŭflanke nomi per “ili”. Al la politikaj kaj militaj kontraŭuloj aldoniĝis nun la klimato, la demografio kaj la epidemioj. La kreita sento estas la jena: la realo estas danĝera, la naturo estas perfidema kaj la homaro, neantaŭvidebla.

Ni vivas kiel civitanoj kaj kiel specio en daŭra situaco de alarmo. Kiel en kiu ajn sieĝa stato, la individuaj liberecoj devas esti bridataj, la privateco povas esti invadita kaj la racian penson oni suspendu. Ĉiuj tiuj limigoj utilas por ke oni ne faru demandojn, kiel ekzemple: kial la financa krizo ne atingis la armilaran industrion? Kial oni elspezis, nur en la pasinta jaro, unu mil kaj kvincent miliardojn da

dolaroj en militaj armiloj? Kial nun tiuj, kiuj provas protekti la loĝantaron de Libio estas ĝuste la samaj, kiuj plej multe vendis armilojn al la reĝimo de kolonelo Muamar Gadafi? Kial oni okazigas pli da seminarioj pri sekureco ol pri justeco? Se ni volas solvi kaj ne nur pridiskuti la mondan sekurecon, ni devas alfronti tre realajn kaj urĝajn minacojn.

Estas amasdetrua armilo uzata ĉiutage, en la tuta mondo, sen la preteksto pri milito. Tiu armilo nomiĝas malsato. Jam en la 21-a jarcento, unu el ses homoj malsatas.

La kosto forigi la mondan malsaton estus tre malgranda ono de tio, kio oni elspezas por armiloj. La malsato sendube estos la plej granda fonto de nesekureco en nia erao.

Mi mencios aldonan silentigitan perforton: en la tuta mondo, unu el tri virinoj estis — aŭ estos — viktimo de fizika aŭ seksa perforto dum sia vivo. Estas vere, ke sur granda parto de nia planedo regas antaŭkondamno pro la simpla fakto, ke ili estas virinoj.

Nia indigniĝo estas tamen multe malpli granda ol la timo. Senrimarke, ni estis transformitaj al soldatoj de sennoma armeo kaj, kiel militistoj sen uniformo, ni ĉesis fari demandojn. Ni ĉesis fari demandojn kaj pridiskuti la



kialojn. La demandoj pri etiko estas forgesitaj, ĉar pruviĝis la barbareco de la aliaj kaj, ĉar ni estas en milito, ni ne bezonas pruvi koherecon, etikon aŭ laŭleĝecon.

Estas tre simbole, ke la sola homa konstruaĵo videbla de la spaco estas muro. La Granda Muro estis starigita por protekti Ĉinion kontraŭ militoj kaj invadoj. La Murego ne evitis konfliktojn nek haltigis invadantojn. Probable mortis pli da ĉinoj en la konstruado de la murego ol tiuj viktimoj de la invadoj, kiuj vere okazis. Onidire iuj laboristoj mortis enmurigitaj dum la konstruado mem.

Tiuj korpoj, kiuj transformiĝis al muro kaj ŝtono estas metaforo pri kiom la timo povas malliberigi nin.

Estas muroj, kiuj apartigas naciojn, estas muroj, kiuj apartigas malriĉulojn disde riĉuloj, sed ne estas nun en la mondo muro, kiu dividas tiujn, kiuj timas kaj tiujn, kiuj ne timas. Sub la samaj grizaj nuboj vivas ĉiuj ni, el la sudo kaj la nordo, el la okcidento kaj la oriento. Mi citos diraĵon de Eduardo Galiano pri tio, kio estas la tergloba timo, nome:

“Kiuj laboras, tiuj timas perdi la laborpostenon; kiu ne laboras, tiuj timas neniam trovi postenon; kiam oni ne timas la malsaton, oni timas la

manĝaĵon; la civiluloj timas la militistojn; la militistoj timas la mankon de armiloj kaj la armiloj timas la mankon de militoj.”

Kaj oportune nun aldonas mi: estas iuj, kiuj timas la finon de la timo.

Dankon.

Diskurso farita de Mia Couto en la Konferenco de Estoril, Portugalio (2011), kaj esperantigita de James Resende Piton.



Daŭrigo de la pago 5

La konklavo

konklavo, same pri kia estas la katolika eklezio. Kaj la fino estas ja nekred-ebla. Mi ne volas tiom pli malkaŝi. Sed, kion mi povas diri estas ke tiom la libro kiom la filmo kreis iomete da polemiko en la religia medio. Sed vivo kun iom da polemiko estas pli interesa, ĉu ne? Laŭ mi, ĝi instigas multajn gravajn demandojn pri kia devas esti preĝejo kaj preĝeja estro nuntempe, kaj mi ege ŝatis kiel la kreanto de tiu historio

montris tion ĉion en tiom kreema kaj pensiga historio.

Mi invitas vin akompani la Kardinalon Thomas Lawrence dum tiu defia konklavo kaj malkovri kiu estas la nova papo en tiu ĉi admirinda filmo! Mi ankaŭ scivolas – Ĉu vi divenis kiun oni elektas? Ĉu vi ŝatis la elektiton kaj la nomon de la nova papo? La filmo estas disponebla ĉe Amazon Prime. Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

La Nevidebla Laboro de Virinoj: Teoriaj kaj Sociaj Konsideroj

La nevidebla laboro farita de virinoj, precipe en la hejma kaj prizorga sferoj, estis historie neglektita kaj sub-taksita, malgraŭ sia esenceco al la funkciado de la socio. Tiu ĉi fenomeno estis traktita de pluraj pensuloj, brazilaj kaj eksterlandaj, kiuj pripensas la seksan labordividon kaj ĝiajn sociajn kaj ekonomiajn implicojn.

Brazila sociologo Heleieth Saffioti estis unu el la unuaj intelektuloj, se temas pri trakti seksan subpremon ligitan al klasrilatoj en Brazilo. En ŝia laboro *Virinoj en Klasa Socio*, Saffioti diskutas kiel virinoj estas duoble ekspluatitaj: per salajrata laboro kaj per hejma laboro, ofte sensalajra. Ŝia analizo estas parto de la marksisma perspektivo, montrante ke konservi hejmajn taskojn sub ina respondeco estas maniero reprodukti kapitalismon, garantianta viran laboron sen kromkostoj al la ekonomia sistemo.

Alia teoriulo signifa al komprenado de la temo estas feminisma ekonomisto Nancy Fraser. En siaj studoj, Fraser

argumentas ke kapitalismo dependas de formoj de socia reproduktado, kiuj estas plejparte daŭrigitaj per la sensalajra laboro de virinoj. Ĉi tiu dinamiko konservas la produktivan strukturon funkciantan dum eternigas seksajn malegalecojn. Por Fraser, vera socia justeco povas esti atingita nur kiam socia reproduktado estas rekonita kaj redistribuita juste inter seksoj kaj inter malsamaj sociaj klasoj.

La koncepto de nevidebla laboro ankaŭ estis vaste diskutita fare de sociologo Arlie Hochschild, verkinto de la libro *The Second Shift*. Hochschild montris kiel virinoj alfrontas "duan deĵoron" kiam ili revenas hejmen post laboro, akceptante hejmajn kaj prizorgajn respondecojn kiuj ne estas dividitaj egale kun viroj. Ĉi tiu fenomeno kontribuas al la fizika kaj mensa troŝarĝo de virinoj kaj plifortigas malegalecojn ene de hejmoj.

Datumoj de la Brazila Instituto pri Geografio kaj Statistiko (IBGE) plifortigas ĉi tiun malegalecon: laŭ la Daŭra

Nacia Hejma Specimena Enketo (PNAD Contínua) de 2019, brazilaj virinoj dediĉas, averaĝe, 21,4 horojn semajne al hejmaj taskoj, dum viroj pasigas nur 11 horojn. Tiu diferenco elstarigas la inan troŝarĝon en sensalajra laboro kaj ĝian efikon al la havebleco de virinoj por la formala labormerkato.

En la brazila kunteksto, esploristino Maria da Glória Gohn kontribuas al la debato analizante la rolon de virinoj en la neformala ekonomio kaj komunuma laboro, agadoj kiuj ankaŭ estas ofte nevideblaj. Laŭ Gohn, virinoj ludas esencajn rolojn en socia evoluo, sed malofte estas rekonitaj aŭ rekompensitaj por tiuj klopodoj.

Filozofo Silvia Federici vastigas la diskuton substrekante ke la seksa labordivido havas profundajn historiajn radikojn, asociitajn kun la ekspluato de virinoj ekde la periodo de transiro de feŭdismo al kapitalismo. En La Nula Punkto de la Revolucio, Federici argumentas ke genra kaj hejma laboro devus esti aprezita kiel fundamenta al la ekonomio, defiante la ideon ke nur salajrata laboro meritas rekonon.

UN-Virinoj ankaŭ substrekas la gravecon de la problemo tutmonde: laŭ la organizo, virinoj plenumas ĉirkaŭ 76% de ĉiuj sensalajraj prizorgaj laboroj en la mondo, kio rekte influas ilian parto-

prenon en la formala labormerkato kaj la tutmonda ekonomio. Ĉi tiu statistiko reliefigas la bezonon de publikaj politikoj celantaj redistribui tiujn taskojn kaj taksi la nevideblan laboron de virinoj.


Konkludo

Se oni konsideras ĉi tiujn pripensojn, estas klare, ke la nevidebla laboro de virinoj estas en la kerno de seksaj malegalecoj kaj la kapitalisma strukturo. Por ke estu progreso en socia egaleco, estas esence rekonii, redistribui kaj rekompenci ĉi tiujn agadojn, krom antaŭenigi publikajn politikojn, kiuj instigas la justan dividon de hejma laboro kaj prizorgado. La lukto por la aprezo de ĉi tiu laboro estas, do, batalo por justeco kaj egaleco, permesanta al virinoj havi pli grandan aŭtonomecon kaj pli bonajn vivkondiĉojn.

Bibliografiaj Referencoj

- FEDERICI, Silvja. La Nula Punkto de la Revolucio: Hejma Laboro, Reprodukado kaj Feminisma Lukto. Novjorko: Oxford University Press, 2019.
- FRASER, Nancy. Fortunes of Feminism: From State-Managed Capitalism to Novliberala Krizo. Londono: Verso Books, 2013.
- GOHN, Maria de Gloro. Povigo kaj Partopreno de Civila Socio. New York: Routledge, 2014.

(Daŭrigota sur la paĝo 27)



Imaga interparolo kun filozofoj

Demandoj al Simone de Beauvoir pri virinaj aferoj, tamen ne nur (Parizo, 1980)

Denove en Parizo, certe unu el la plej vizitendaj urboj por trovi filozofojn, mi iris al Café de Flore kaj, kiel atendite, mi renkontis tie Simone de Beauvoir, jam sufiĉe maljunan, sed kun la lucideco kaj sendependeco de ĉiam.

Ŝi ŝajnis iom surprizita, kiam mi alproksimiĝis kaj tuj faris demandon, sed respondis ĝentile.

— Sinjorino Beauvoir, vi ĉiam defendis liberecon kaj aŭtonomecon. Sed kiam mi legis “La Invititino”, mi sentis impreson pri forta sento de ĵaluzo, eĉ ene de la malferma rilato, kiun vi kaj Sinjoro Sartre havis. Ĉu fakte vi ĵaluzis?

— Libereco ĉiam estis en la centro de mia pensado, same kiel en tiu de Sartre. Nia interkonsento baziĝis sur absoluta honesteco, ni ne volis esti

malliberigitaj de la burĝaj konvencioj de tradicia geedzeco. Sed libereco ne signifas foreston de sentoj.

— Krom ĵaluzo, inter geedzoj kutime estas sento de posedo, de regado...

— Ĵaluzo, deziro, sento de posedo, ĉiuj estas emocioj apartenantaj al la homa komplekseco. “La Invititino” estas romano, sed inspirita de realaj spertoj. Françoise, la ĉefrolulino, alfrontas la angoron dividi sian amon kun alia virino. Tio ne estas simple ĵaluzo, sed timo perdi ion esencan de si mem.

Stimulita de ŝia intima tono, mi kuraĝis fari eĉ pli personan demandon.

— Sed ĉu tio ne kontraŭdiras vian ideon pri amo al libereco?

— Ankaŭ en libereco estas doloro kaj amo kaj doloro kunvivas. La vera defio de ni, amantoj, estas alfronti ĝin kaj ne nutri la deziron meti la amaton en kaĝon. Por mi, transformi tiun dilemon en literaturon estis maniero solvi tion sen elspezo por psikologo.

— Ha, diraĵo samtempe profunda kaj amuza... Parolante nun ankoraŭ pri virinoj, sed en alia situacio, vi, en la verko "La Dua Sekso", revoluciigis la manieron kiel ni pensas pri la rolo de virinoj en la socio. Kiel estis alfronti la reakcion de viaj samtempuloj antaŭ via deklaro, ke virinoj ne naskiĝas virinoj, sed fariĝas virinoj?

— La afero estis defia. Multaj volis redukti la inan kondiĉon al biologio, kvazaŭ nia identeco estus io natura kaj neŝanĝebla. Sed la vero estas, ke la socio trudas normojn kaj atendojn pri kio signifas "esti virino". Mia intenco estis malkaŝi tiun strukturon kaj doni al virinoj ilojn por pridubi ĝin.

— Ĉu vi kredas, ke hodiaŭ, jardekojn poste, ni progresis sur la vojo al vera egaleco?

— Ni progresis, sed la lukto daŭras. Seksismo ne malaperas, ĝi ŝanĝiĝas. Virinoj gajnis rajtojn, sed ili ankoraŭ alfrontas obstaklojn, en la politiko, en la laboro, en siaj personaj vivoj. La

ŝlosilo estas edukado, konscio kaj kuraĝo diri, ke neniu virino akceptu malpli ol plenan liberecon. Libereco ne estas donita al ni, ni prenas ĝin.

— Bonege. Kaj nun, ŝanĝante la temon, mi havas demandon pri via verko "Maljuneco". En ĝi vi kondamnas la marĝenigon de maljunuloj en la socio. Ĉu vi kredas, ke tio okazas pro timo pri maljuneco aŭ pro pura neglekto?

— Timo pri maljuneco estas profunde enradikiĝinta en okcidenta kulturo. La socio alte taksas junecon, produktivecon kaj aŭtonomecon, tio estas, aferojn minacatajn de maljuneco. Rezulte, la maljunuloj estas puŝataj al la marĝenoj, traktataj kiel nevideblaj estaĵoj. Sed ankaŭ ekzistas neglekto. La maljunuloj jam ne estas vidataj kiel individuoj kun deziroj kaj personaj historioj kaj estas reduktitaj al nombroj en statistikoj pri socia sekureco kaj sano.

— Kiel domaĝe! Ĉu ekzistas solvo por tio?

— Tiu malestimo ne estas neevitebla. Ĝi estas socia konstruo, kiu povas kaj devas esti detruita.

— Kompreneble. En la libro vi asertas, ke maljuneco ne estu vidata nur kiel individua problemo, sed kiel socia

afero. Kiujn ŝanĝojn vi konsideras esencaj, en la praktiko, por ke tio realiĝu?

— Jen bona demando. Mi pensas, ke unue ni bezonas ŝanĝi la kolektivan pensmanieron. La maljunuloj ne estas apartaj estaĵoj, sed prefere homoj, kiuj daŭre ekzistas kun pasioj, ideoj kaj deziroj. La socio devas provizi la kondiĉojn por ke ili vivu plene: aliron al kulturo, ŝancojn por partopreni en la komunumaj aktivecoj kaj rekonon de ilia sperto. Krome, estas esence revizii publikajn politikojn: garantii justan emeritiĝon, plibonigi sanservojn kaj kontraŭbatali aĝdiskriminacion. Nur kiam ni ĉesos ignori maljunecon kiel legitiman kaj valoran fazon de la vivo, ni povos konstrui vere egalecan socion.

— Ho, kiajn perlojn de filozofio kaj etiko mi kolektis hodiaŭ! Dankegon, Sinjorino Beauvoir. En la Urbo-Lumo, en ĉi tiu ikoneca kafejo, en tia kompanio... Kia bonŝanca mi estas! Bedaŭrinde mi devas foriri, do mi petas, elektu unu el viaj preferataj pensoj, por pliriĉigi la trezoron, kiun mi kunportos.

Ŝi ridis pro mia entuziasmo kaj afable kontentigis min per ĉi tiu alia perlo:

“Voli esti libera signifas voli, ke ankaŭ la aliaj estu liberaj.”

José Mauro Progiante



La ribelema raŭpeto

Dirce Sales



Kolorilustrita infanlibro
pri raŭpeto decidita
antaŭtempe mem
fari flugilojn por si

easp.org.br/butiko

Ĉiutaga poezio

Maria Nazaré Laroca

Flugilhavaj steloj poemas
kaj venas sur mian ŝultron
por ekparoli siatempe.
Aliaj versoj min vizitas,
ekaperas ĉe la rondo,
svingante flagojn vice
kontraŭ mizerojn de l' mondo.
Sed ĉe mi rifuĝej' neblas,
do tuj ilin mi disdonas
al l' avidaj amaskomunikiloj.
Tiel pri dolor' mi ne kantas:
birdbabilon mi preferas,
kaj florodoron flugantan en vento.



Maria Nazaré Laroca (El Birda grundo_Chão de pássaros. Rio de Janeiro: Lorenz, 2017.)

Malgranda povas esti tre granda

Milton Paulo de Lacerda

Tre maljuna klientino mia, inter aliaj plendoj dum nia konversacio, lamentis la monotonecon de ĉiutagaj aferoj. Pro ŝiaj difektitaj vidkapablo kaj piedirado, ŝajnis al ŝi, ke la malgrandaj kaj ordinaraj aferoj, kiujn ŝi ankoraŭ havis ĉemane, eĉ ne meritis mencion. Mi petis ŝin prirakonti al mi kelkajn eblajn belajn spertojn, kiuj okazis dum la semajno.

Tiumomente la kalejdoskopo, la optika ludilo, subite venis al mia mensso. Ĝiaj multkoloraj pecetoj, preskaŭ ĵetitaj en la "lenson" de la simpla aparato, estis nenio pli ol malestimindaj sentaŭgaj vitropecetoj. Viditaj ekster la aparato, senkonsidere pri ilia preciza celo, eble ni forĵetintus ilin. Tamen, laŭ kaprico de probablecoj, formiĝis interne mirindaj figuroj, originalaj de-segnaĵoj, malgrandaj verkoj de baroka arto.

Tiaj estas la faktoj de la ĉiutaga vivo. Malgrandaj, ŝajne negravaj aferoj, "aferoj kiuj ja devis okazi" oni diras, sensencaĵoj por kiuj neniu donus sian vivon. Tamen, tiaj aspektoj povas esti

trompaj. Ekzistas ĉiam renoviĝanta dinamismo kiam ĉiufoje ni ripetas la samajn gestojn: kovri tablon, lavi tele-rojn, veturi per aŭto, ordigi la liton, duŝi, respondi telefonon, trinki kafon dum laborpaŭzo, kisi edzinon kaj infanojn. La forto loĝas en ni, disponebla por plenumi ajnan taskon. La ekstereco de la agoj eble ne meritas fraptito-lojn en la gazetoj; sed spirito, entuziasmo kaj persistemo povas transformi tiujn malgrandajn aĵojn en lumigitajn objektojn, malgrandajn artaĵojn. Neniu vidas, neniu rimarkas ilin, ĉar la signifo de agoj venas de interne.



Sed tio ne kontentigos homon, kiu konscias pri la valoro de la vivo. Mi ankaŭ komentis al mia klientino pri iu dolĉaĵo, kiun ŝi vere ĝuis. Ŝi rakontis al mi pri rizpudingo. Mi demandis ŝin ĉu ŝi ankoraŭ manĝus ĝin ĉiutage kun plezuro ĉi-semajne, konsiderante ke ŝi jam estis manĝinta ĝin la antaŭan semajnon. Ŝi ne hezitis konfesi, ke ŝi tion faradus. Tio kion ni faras kun plezuro ne lacigas, ĝi povas esti ripetata sennombrajn fojojn; kaj ni restas same volemaj kiel komence, eble eĉ pli motivitaj kaj konfirmitaj en nia deziro kaj kontenteco.

La plej granda problemo estas kiom malmulte ni atentis tion, kion ni faras. Ekzemple, mi ne neos, ke mi ŝatas skribi, ke tajpi per la klavaro estas kutimo, ke ĝi ne kostas al mi multan atenton. Tamen ekzistas ingredienco, kiu ĉiam renoviĝas en ĉiu linio:

la virtuala vizaĝo de la leganto, ĝia ebla uzo, la malfermo kiu eble trovos indicojn al pli feliĉa vivo. Kaj tio donas tute originalan signifon al ĉiu artikolo, ĉiu ĉapitro, ĉiu libro, kiun mi ekverkis.

Gravas ja ne kion ni faras, materie parolante, nek la tempo, kiun ni pasigas dum ĉi tiuj agadoj. Sed, jes, amo kaj ĝojo, kiujn ni permesas al ni konscie meti en ĉi tiujn okupojn. Estas kvazaŭ ni turnus la kalejdoskopon, atendente la surprizon kaŭzitan de la nova aranĝo de la malgrandaj pecoj de kolora vitro. Nenio en la vivo malhelpas nin esti artistoj. Ni eĉ ne bezonas multekostajn kaj maloftajn materialojn. La plej simplaj, plej banalaj, plej praktikaj, plej ordinaraĵoj sufiĉas. Ĉar ĉi tiu estas la materialo, kiu faras pli bonan mondon. La cetero, la restaĵo estas afero de amo kaj ĝojo.

Kulturkunveno

SABATO
28 JUN
je la 15-a



Esperanto Asocio de San-Paŭlo

La ribelema raŭpeto



Rua Faustolo, 124 - Água Branca



Dirce Sales

Iom pri la Akademio de Esperanto

Fernando Pita

Ankoraŭ surprizita de la afabla invito farita al mi ion verki por *La Lampiro*, mi proponis al la kara redaktoro teksti kelkajn frazojn pri la laŭ mi plej grava — tiom grava kiom flankenlasata — institucio de la esperanta mondo: la *Akademio de Esperanto*.

Dekomence mi devas klarigi, ke la Akademio, tiel kiel ĝi estas nun, estis (re)kreita, en 1948, de la 45 membroj de la antaŭa Akademio kaj de la Lingva Komitato pluvivintaj la Duan Mondmiliton; kaj ke en ĝi jam partoprenis diversaj elstaraj brazilanoj, kiel Porto Carreiro Neto, Sylla Chaves, Leopoldo Knoedt kaj Geraldo Mattos, kiu eĉ prezidis ĝin inter 1998 kaj 2007.

Tamen, kial mi diris ke ĝi estas la plej grava el niaj asocioj? Simple, karega amiko, ĉar nia movado povas diversmaniere organizi sin, kaj jen la malsamaj modeloj de UEA, de SAT, de la Esperanta Civito, ktp, por konfirmi tion; sed ni neniam sukcesos pluvivi se

nia lingvo dispeciĝas en milojn da dialektoj aŭ da reformproponoj kiuj, krom foruzi niajn energiojn en senfinaj disputoj, porĉiame damaĝos nian bildon antaŭ la ĝenerala publiko.

Gardi nian lingvon kaj ĝian Fundamenton kontraŭ ĉiuj atakoj; batali pro kaj por ĝia unueco kaj kohero, internaj kaj eksteraj, defendi Esperanton antaŭ ĝiaj malamikoj kaj konkurantaj planlingvoj; jen la plej gravaj roloj de la Akademio. Kio ja ne estas malmulto, ĉu ne?

Tamen, krom tio, ĝi ankaŭ organizas, realigas ĉiujarajn konferencojn (ĉu en UK-oj, ĉu per interreto), verkas (jam de jardekoj...) la oficialan vortaron de nia lingvo, kontrolas lernilojn kaj ekzamenojn, akceptas aŭ rifuzas neologismojn, kaj lastvorte regulas tiujn situaciojn en kiu homoj diverĝas. Unu ekzemplo rilatas al la nomo de mia Mirinda Urbo: laŭlonge de nia historio estis kreitaj 14 malsamaj esper-

antaj formoj por mencii Rio de Janeiro. Post jardekoj da diskutoj, finfine, en la lasta Oficiala Aldono al la Vortaro, la Akademio decidis ke, en Esperanto, la ĝusta nomo de mia naskiĝurbo estas... *Riodejaneiro*.

Ĝuste ĉar la Akademio devas defendi la lingvon kontraŭ ĉiuj, kaj ne malofte de nia movado mem, hunda fideleco al la Fundamento de Esperanto estas atendata de ĉiuj, kiuj kandidatiĝas al la Akademio. Kiel kroma garantio por tiu fideleco, Akademio de Esperanto estas (miascie) la nura akademio en la mondo en kiu ĉiu el ĝiaj 45 membroj ricevas 3, 6 aŭ 9 jaran mandaton, akorde kun la kvanto da voĉdonoj ricevitaj dum balotado. Tial ni ne estas nemortemaj, kiel la membroj de la Brazilia Akademio; kaj tiel, se iu el ni malobeas la Fundamenton, sufiĉas atendi la venontan balotadon kaj ne voĉdoni favore al tiu homo por ke la problemo estu solvita. Kaj, kredu min: tio jam okazis!

Alia komparo farenda al la Brazilia Akademio estas ke oni ne havas terenkontiĝojn nek (domaĝe!) ajnan financon helpon kontraŭ nia laboro serve al la esperanta komunumo, kaj mia opinio ankaŭ ĉi-kaze la Akademio multon faras: estas en ĝi komisionoj pri gramatiko, fonetiko, literaturo, vortaro, historio de Esperanto, ktp. Ankaŭ estas komisiono por atribuo de la *Laŭro de la Akademio*, premio al la plej elstara beletra verko en nia lingvo. Krom tio, ĉiu esperantisto rajtas skribi (en Esperanto!) al la akademianoj kaj konsulti ilin rilate al siaj personaj pri lingvaj duboj (Do ne hezitu fari tion!)

Jen en mallongaj vortoj eta pri skribo de nia Akademio, kies grava laboro nur kompareblas al la silento en kiu ĝi estas farita. Tamen, diru nun, mia kara, ĉu nun ankaŭ vi ne kredas ke ĝi meritas iom pli atento el la esperantistaro? Se jes, komencu per vizito al ĝia retpaĝo ĉe <https://www.akademio-de-esperanto.org>.



easp.org.br/butiko

Kinkas Borba

Machado de Assis

Tradukis

Francisco S. Wechsler

Lingvaj Respondoj

de Francisco Wechsler



Demando

De tempo al tempo oni trovas en la reto kaj eĉ en revuoj frazojn kun akuzativo post titolo. Ekzemple:

Hieraŭ mi vidis Profesoron Franciskon surstrate; Mi tre admiras la akademianon Alberton; La mondo sopiras la Papon Franciskon. Ĉu tiu uzo estas ĝusta?

Respondo

La demando koncernas punkton de la Esperanta gramatiko, nomatan *nomino* aŭ *identiga priskribo*. Temas pri substantivo, kiu montras la identecon de afero, normale per ĝia propra nomo.

Laŭ modernaj gramatikoj, nominacio sekvas la jenajn regulojn:

1. Ĝi ĉiam devas veni tuj post la ĉefa vorto, kiun ĝi identigas.
2. Ĝi devas ĉiam resti en la nominativo, eĉ se la ĉefa vorto estas en la akuzativo.
3. La priskribo ordinare ne uzas prepozicion.

Por faciligi la uzadon, oni ofte povas enmeti la frazparton *kiu nomiĝas* antaŭ nominacio.

Ekzemploj:

*Tio estis en la **monato Majo**, [...]* (F. de Andersen). La substantivo *Majo* identigas la monaton, kaj ĝi estas nominacio. Ĉi tie ne ekzistas malfacilaĵo, ĉar kaj la ĉefa vorto (*monato*) kaj la nominacio (*Majo*) restas en la nominativo.

*Dum ĉiu privata esperantisto povas kontentiĝi per tio, ke li uzas la **lingvon Esperanto**, [...]* (Paroladoj de L. L. Zamenhof) La substantivo *Esperanto* identigas la lingvon, do temas pri nominacio, sekve ĝi ne ricevas akuzativon. Oni povus ŝanĝi la frazon al: [...] *la lingvon, **kiu nomiĝas** Esperanto.*

[...] *la filoj de Izrael ekveturigis **sian***

patron Jakob [...] (Malnova Testamento) La ĉefa vortoduo estas *sia patro*, kaj la nominacio estas *Jakob*.

*Graco estu kun ĉiuj, kiuj sendekliniĝe amas **nian Sinjoron Jesuo Kristo**. (N. Testamento) Jesuo Kristo estas la nominacio, kiu identigas nian Sinjoron.*

Simile, la ekzemploj donitaj en la demando devus teksti, laŭ la moderna uzado: *Hieraŭ mi vidis **Profesoron Francisko** surstrate; Mi tre admiras la **akademianon Alberto**; La mondo sopiras la **Papon Francisko**. Tie ĉi la personnomoj (Francisko kaj Alberto)*

identigas la titolojn (*Profesoro, akademiano kaj Papo*), do ili rolas kiel nominacioj.

Tamen estas vere, ke Zamenhof hezitis pri la kazo de nominacio. Ekzemple:

*Mi ilin suferus eble pli longe, se mi ne renkontus [...] **sinjoron Eduardon**. (Marta) Moderne oni dirus Eduardo.*

*Nur tiam, kiam li atingis la **ĉarmegan urbon Nurenbergon**, [...] (F. de Andersen). Moderne oni dirus Nurenbergo.*



Daŭrigo de la pago 17

Edukado

- HOCHCHILD, Arlie. La Dua Ŝanĝo: Laboraj Familioj kaj la Revolucio Hejme. New York: Penguin Books, 2012.
- SAFFIOTI, Heleieth. Virinoj en Klasa Socio. New York: Routledge, 2015.
- IBGE. Kontinua Nacia Domanaro-Prova Enketo (Kontinua PNAD). Havebla ĉe: <https://www.ibge.gov.br>. Alirita en: 2024.
- UN VIRINOj. Raporto pri Prizorga Laboro kaj Seksa Malegaleco. Havebla ĉe: <https://www.unwomen.org>. Alirita en: 2024.

Patricia Guerra Radsack

PhD-studento ĉe Salgado de Oliveira University – Niterói-RJ Campus. Havas

magistron de Universidade Salgado de Oliveira – Campus Niterói-RJ. Estas diplomita pri Historio ĉe la Universitato Salgado de Oliveira en São Gonçalo – RJ. Ŝi havas kvalifikaĵojn en Geografio, Sociologio kaj Filozofio. Disvolvas esploradon en la areo de krimo en la regiono Santa Luzia do Carangola fine de la 19-a jarcento.



Unu plia bela kultur-ekskurso

Paulo S. Viana

Je la 31-a de majo ĵus pasinta, grupo de EASP-anoj travivis unu plian belan ekskurson en la centra regiono de la ĉefurbo San-Paŭlo. Tio estis unu plia programero en la serio starigita en nia asocio, por stimuli ĉeestajn kunsidojn inter la samideanoj.

Tion iniciatis antaŭ nelonga tempo du aktivaj kaj kompetentaj esperantistoj: Cristina Graaf, vic-prezidanto de EASP, kaj Wilian Gomes, fakulo pri instruado de lingvoj. Ambaŭ estas fluaj parolantoj de nia lingvo kaj profesie diplomitaj pri turisma gvidado.

Dum tiu promonado, oni parolas Esperanton, eventuale kun klarigoj ankaŭ en la portugala lingvo, se ĉeestas homoj tion bezonantaj. Jen bela maniero praktiki la lingvon, kleriĝi kaj amuziĝi!

Dum la supre menciita ekskurso, ni vizitis la ĉefpreĝejon de la urbo, kaj eksciis pri tre interesaj historiaj aspektoj de tiu majesta katolika templo. Poste ni vizitis la Muzeon de “Caixa Econômica Federal”, antikvan institu-

cion kiu enhavas riĉan konstantan ekspozicion. Tute improvize, la Esperantistoj estis tie invititaj partopreni en ateliero pri gravurado sur papero.

La sekva turisma loko estis la palaco de Markizino de Santos, grava figuro en la tempo de la imperio. La domo estas mirinde bela kaj konservita.

Laste, ni vizitis la unuan domon konstruitan en la urbo (en la 16-a jarcento!), nome la jezuita kolegio, kiu estas belega kaj ankaŭ bele konservita.

La tuta promeno estis farita piede, kio faciligis agrablan babiladon inter la promenantoj. Fine de la ekskurso, ni estis elkore dankaj al nia gvidanto, la vigla kaj entuziasma Wilian Gomes.

Kulturaj Ekskursoj de EASP okazas ĉiam en monatoj, kiam estas kvina sabato, matene. Ili estas senpagaj. Venu kun ni en la proksima! Estu bonvena!


Kion ili diris

Kompilinto: César Dornelles





Kial oni mortigas la personojn kiuj mortigis iun? Por diri al la aliuloj, ke mortigi estas malbona afero? — **Norman Mailer**

La tragedio de la homo estas tio, kio mortis ene de li dum li ankoraŭ vivas.
— **Albert Schweitzer**




Oni povas juĝi la gradon de civilizo de iu socio enirinte en ĝiajn prizonojn. — **Fjodor Dostoevskij**

Al saĝa homo sufiĉas la necesa afero.
— **Eŭripido**



Mi ne kredas je Dio kaj mi neniam havis religian krizon. Sed mi ne povas ignori, ke kvankam mi ne estas kredulo, mia pensmaniero estas kristana. — **José Saramago**

Estas aferoj, kiujn oni plibone diras silentiĝante.
— **Machado de Assis**



Ne ĉiuj ideoj estas por la oreloj. — **Umberto Eco**

Por paroli al la vento, sufiĉas vortoj. Por la paroli al la koroj, oni bezonas verkojn. — **Pastro Antônio Vieira**



17º Congresso Paulista de Esperanto

20 - 21 setembro 2025

São José dos Campos-SP

Hotel Ema Palace

Rua Jorge Barbosa Moreira, 70

Organização



Apoio



<https://evento.easp.org.br>